## Mi ne fidas homojn, kiuj ne ŝatas Brassens!

Mi ne partoprenas la intiman rondeton de Georges, neniam mi tanĝis Lian Gitaron; ĉiondirante neniam mi strabas al lia bona pipo. Malgraŭ ĉio, li estas mia amiko.

Kiel multaj, mi mamsuĉis lakton de Brassens ekde mia plej frua infanaĝo, kaj mi senatente kreskis ĉe la ombro de liaj lipharoj. Lia varma kaj esprimplena voĉo estis natura gvidomarko kiu revenis de koncertsalono al koncertsalono, benitaj momentoj, kie mia lampradio fascinis rigardon (pro ĝia rava lumo) kaj revarmigis animon.

Venis la esenca, turmenta tempo de la adoleskeco. Jen Brassens ampleksiĝis. Kion li ĉiam diris, jen tio ekhavis sencon. Plie, la tiutempaj amikoj, eksaktivuloj de la 1968-a movado, iomete liberecanj, tute agnoskis tion.

Finine, oni perceptis ke malantaŭ la malprudeta kanto – la Gorilo – estis caŝita la abomeninda mortpuno, oni spertis la toleremon, la pacismon… Kaj la kantita amikeco de oĉjo Georges plifortigas nian. Ankaŭ, lia muziko regalis sin, malplaĉe al "lavmeblaj oreloj" kiel diris la amiko Fallet.

"La rumoro de mia morto estis tre troiga!" ŝercis Brassens, post la mallertaĵo de iu gazetistaĉo. Ve ! ĉesu ridi: "La veraj enterigoj tuj ekkomencis". Jam dek jaroj de fraŭdiĝo. Mi, kiu multe revis renkonti lin hazarde, inviti lin trinki unu aŭ du glasojn, babilante ĝentile. Mi kredas pri tio pli kaj pli-malpli… Mi diras dek jarojn, ankaŭ ni povus kalkuli la unuajn jarojn de cenzuro. La epoko, kiam indaj spirituloj ŝoketis sin pro kelkaj malprudetaj paroloj. Kvazaŭ la poeto povus esti maldelikata, bando da analfabetuloj! (Ni provu: "Ĉe la bela Suzon, nek mono nek plezuro..." kaj "La neŭtrona bombo estas pura armilo." Forstreku la obscenan mencion)

Hodiaŭ, kio restas pri tio? Moralo, ideo? Pŭah! korektintus Brassens, sentoj. Do, kvankam modesta, ni donu unu el ili, kiu ankoraŭ povas utili:

*"Gloro al tiu, kiu ne havante sanktan idealon,*
*Simple kontentiĝas ne tro tedi siajn najbarojn"*

Bop, la 29-an de oktobro 1991